

## Raporto pri la agadoj de Mirejo en Senegalo

2012-12-26 ĝis 2013-01-09

### Radioelsendo

#### Almadina, Dakaro

En 2011 mi estis en Senegalo por deĵori en budo pri eo en Monda Socia Forumo. Tiam mi konatiĝis kun ĵurnalisto Famara Niassy. Ni faris 29-minutan elsendon pri Afriko kaj eo. Tiu elsendo ĉe *Radio Convergences FM* troviĝas sur mia blogo Ipernity, Mirejo, Galerio.

Poste mi faris 3 elsendojn kun li per telefono.

Kiam mi alvenis al Dakaro en decembro 2012, li volis, ke mi venu al la radio dimanĉe je la 11a horo por paroli en rekta dissendado, tamen en tiu tago mi devis esti en Rufisko por ekzamensesio. Pro tio ni registris la elsendon vendrede vespere en Radio Almadina. Daŭro 45 minutoj. Temoj : Afriko, elmigrado, ekonomio, politiko, kaj eo.

Dum la kurso en Rufisko ni povis ĉiuj kune aŭskulti ĝin kaj sekvis debato.

### Universitato Ĉeikh Anta Diop (UCAD), Dakaro

Tie studas proks 60 000 gestudentoj.

En 2011 mi vidis tie ekspozicion kies titolo estas « La kontribuo de nigrula Afriko al la progreso de sciencoj kaj teknikoj ». Mi fotis ĝin kaj rilatis kun la komunikadestro de la Biblioteko Sinjoro Samb por esplori, kiel mi povas venigi la ekspozicion al Eŭropo.

Temas pri privata plano. La ekspozicio vidiĝas sur mia blogo mirejo3.blogspot.com, « Inventivité africaine »

<http://mirejo3.blogspot.ch/2011/02/inventivite-africaine-afrika.html>.

Diversaj kontaktoj okazis dum du jaroj inter Sinjoro Samb, sinjoro Wagué, unu el la aŭtoroj de la ekspozicio kaj mi. Mi uzis la okazon esti surloke en 2012-2013 por denove rilati kun Sinjoro Samb, ĉar la du aŭtoroj de la ekspozicio ne estis en Dakaro dum mia restado. Antaŭ la kurso en Rufisko mi ne trovis lin. Post la kurso mi trovis lin, kelkajn horojn antaŭ mia ekflugo al Svislando. Ni parolis pri tiu ekspozicio, sed ankaŭ pri eo kaj pri la eventuala tutmonda Konferenco de ILEI en Senegalo. Mi prezentis la kutimon de la simpozioj kaj aludis al ebla kunlaboro kun profesoroj el UCAD. Li diris, ke estos neniu problemo organizi tion.

Pri la ekspozicio, mi demandis, al kiuj lokoj ĝi migris post februaro 2011. Sinjoro Samb klarigis, ke la ekspozicio iris nur al la universitato de Saint-Louis du Sénégal. Mi substrekis, ke gravas montri ĝin, ke ĝi ne devas resti en iu loko, kelo, fermita... Pro tio mi prezentis mian planon : akiri la ekspozicion en digitala formo kaj fari kopion por Eŭropo. Tiel la ekspozicio povus plu migri tra Afriko. Mi demandis, ĉu li konas iun personon en la Universitato de Abomey-Calavi en Kotonuo, Benino. Li respondis ke ne. Tra « Scio Sen Bariloj » aŭ tra Sinjoro Fabrice Houniez-Aze, direktoro pri la Homaj Rajtoj en la benina registaro, kiun mi ekkonis ĉe UN en Ĝenevo kaj kiu apartenas al la registaro de tiu grava benina urbo, mi povus esplori pri kontakto. Mi proponis tion. Li estis tre kontenta. Mi substrekis, ke ambaŭ vojoj eblas pro kaj per eo.

### Kurso kaj ekzamensesio en Rufisko

Tie okazis renkontiĝo kun Sinjoro Beye, vic-urbestro, kiu laboris ĉe UNESKO en la okdekaj jaroj kaj bone konas eon. Mi jam raportis pri la disvolviĝo de la solena malfermo kaj pri la tuta sesio.

Notendas, ke la Centro dependas de la ministrejo pri laboro kaj ŝtatoficistaro. La direktoro de la Centro Sinjoro Sy raportis pri esperanto ĝenerale kaj pri la kurso kaj ekzamensesio dum granda kunsido en ĉeesto de la ministro. Abundajn informojn li ricevis de Sinjoro Assane Faye, prezidanto de Senegala Esperanto Asocio (SEA).

## **Esploroj pri farebleco en Dakaro, Rufisko kaj Thiès**

Kiel mi promesis al Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, mi faris esploron pri farebleco por prezenti eblan lokon por ILEI-Konferenco en Senegalo, eble en 2015, eble en 2016. Fakte mi faris esploron en kvin lokoj.

Dakaro : feria centro de banko BCEAO

Dakaro : hotelo Onomo

Rufisko : « Nacia Centro por Lertigado kaj Agado », tie kie la kurso okazis.

Thiès : Instituto Germaine Legoff

Thiès : « Kapabliga Centro por Daŭripova Evoluo »

Dokumentoj ĉi-rilataj iris al Stefan MacGill. Fotoj vidiĝas sur mia blogo mirejo3.blogspot.com ekde la 13a de januaro.

## **Renkontiĝo kun Sinjoro Aliou Sarr, Dakaro**

Li estas ŝtatoficisto pri instruado de legado/skribado kaj fakulo pri uzo de la lokaj lingvoj en la instruado. Kontakto jam okazis kun esperantisto Antoine Gomis. Kiam mi aŭdis de Antoine pri tiu pozitiva antaŭa kontakto, mi petis Antoine rilati kun Sinjoro Sarr celante kunvenon kun mi triope. Tio sukcese okazis, parolado daŭris pli ol unu horon. Mi parolis pri diglosio en Svislando, (diglosio estas konstanta uzo de du lingvoj aŭ pli) iom simila al diglosio en Afriko, pri la simpozio okazonta, –unta en Senegalio dum ILEI-Konferenco. Mi plie prezentis la problemon de la nova romanĉa planlingvo enkondukita en Grizono, Svislando.

Li abunde parolis pri sia laboro kaj la lingva situacio en Senegalo. En tiu lando estas oficiala lingvo la franca kaj naciaj lingvoj 26. 19 el ili estas nun enkodigitaj. La registaro sukcesas enkodigi po unu lingvon ĉiujare. Diversaj landoj subtenas tiun agadon : Kanado, Germanio, Luksemburgio. Li zorgas pri instruado al infanoj kaj plenkreskuloj, kiuj ial maltrafis la publikan instruadon en la franca ; por ili la ŝtato ofertas kursojn en la ŭolofa lingvo. Poste ekzistas pontoj por ebligi al la plej bonaj lernantoj salti al publika lernejo. Ĉar li estas en laborgrupo, kiu zorgas pri stabiligo de la lokaj lingvoj, li estas en kontakto kun la profesoroj pri lingvistiko de UCAD. Do senprobleme li povas helpi al ni trovi la kontaktojn kun fakuloj. Sinjoro Sarr anoncis, ke laŭ nia diskuto kaj laŭ la ricevita dosiero pri EO li verkos raporton por la ministro pri edukado.

Plie mi menciis la agadon de TEJO en Togolando pri alfabetigo, tamen mankas al mi la detaloj. Li diris, ke ni devas esplori pri agadplano en rilatoj kun la amaskomunikiloj, komunikstrategio. Ni parolis pri diversaj gazetoj. Kompreneble por aperigi artikolojn oni devas pagi. Temas pri tre fruktodona kunveno.

## **Renkontiĝo kun ministro Sinjoro Ali Haidar, Dakaro**

Li estas ministro pri ĉirkaŭaĵo, naturprotektado. Tiu renkontiĝo okazis ĉe la maro en centro Oceanium. Antoine kaj mi sidis atendante ĉe la marbordo en belega loko. Antoine klopodis organizi kunvenon kun la ministro, tamen la ministro diris, ke li ne havas tempon kaj indikis al ni la nomon de la Ĝenerala Sekretario de sia partio. (Vidu sube). Kiam Antoine vidis la ministron alvenante al la marbordo (fakte la ministro hazarde venis samtempe kiel ni) Antoine alparolis lin pri eo. La ministro diris : « Kio estas tio ?? » en misfida tono. Poste ambaŭ venis al mi kaj ni eksidis triope. Mi demandis : « Ĉu vi povas dediĉi al mi 3 aŭ 5 minutojn ? » Li respondis : « 3, jes ». Do mi koncize prezentis eon. Li plu parolis dirante : « La arbo, kiun mi plantas, havas nek religion, nek kulturon, nek haŭtokoloron ; ĝi nur nepre volas kreski. Tio estas por mi esperanto ». Iom enigma eldiro... Mi sentis kaj komprenis lian penson kaj plu diris : « Per esperanto vi povus paroli pri via ideo al la tuta mondo ! » Plie mi demandis : « Ĉu vi estas disĉiplo de Wangari Muta Maathai, tiu kiu plantas arbojn ? » Li respondis : « Mi estas disĉiplo de neniu, nur de miaj gepatroj. Mi laboras por la naturo, mi ne plu havas tempon por mia familio, miaj geamikoj... » Mi venis kun

dosiero pri eo kaj donis ĝin al li. Sinjoro Ali Haidar estas libandevena, tamen naskiĝis en Senegalo kaj iris dufoje al Libano.

### **Renkontiĝo kun Sinjoro Oumar Faty, Dakaro**

Li estas Ĝenerala Sekretario de la politika partio FEDES : *Fédération démocratique des Ecologistes du Sénégal* (demokrata federacio de senegalaj verduloj). Li estas plej proksima kunlaboranto de la Ministro Ali Haidar, kiu estas ministro pri ĉirkaŭaĵo. Li venis al la marbordo, centro Oceanium, por vidi nin, Antoine kaj min. Antoine havis kontaktojn kun li en la Monda Socia Forumo kaj povis konstati, ke Sinjoro Faty estas tre pozitiva al eo. Fakte estas tiel : Faty diris : « Kiel mi povas transdoni informojn pri eo al ĉiuj miaj membroj ? » Mi sugestis, ke kadre de iu kunsido, sinjoro Faty venigu esperantiston por prezenti eon dum 30-minuta parolado kaj 15-minuta debato. Mi lanĉis la nomon de Lafi Charles Diatta. Sinjoro Faty pozitive reagis.

### **Renkontiĝo kun Sinjorino Anne Müller, UNESCO Dakaro**

Ŝi laboras en la UNESKO-oficejo en Dakaro. Ŝi estas dandevena. Mia celo estis prezenti al ŝi la librojn de Hubert Guézo, kun kiu mi kunlaboras. Temas pri privata afero. Tamen mi parolis pri eo. Mi menciis la broŝuron pri Tarfolio verkita dum la ILEI-konferenco en Porto Novo (Benino) en 2008. Mi menciis la du rezoluciojn kaj nian ĉeeston en Parizo per la kunlaboro de 5 delegitoj. Mi donis al ŝi dosieron pri eo. Mi menciis la kopenhagan UKon. Ŝi prezentis al ni la 12 librojn Bouba kaj Zaza, pri kiuj ŝi fieras. Mi konas ilin, mi povis pozitive komenti. Mi lanĉis la ideon pri traduko al eo. Ŝi donis al mi la nomon de la respondeculo pri eldonado en Parizo Sinjoro Ian Denison.

### **Renkontiĝo kun Alphonse Diatta, Dakaro**

Temas pri la unua esperantisto en Senegalo, lernanto kaj disĉiplo de Sinjoro Hans Bakker. Li restadis en Kazamanco, sude de Senegalo, dum mia kurso. Pro tio li ne aperis.

Ĉar Sinjoro Hans Bakker skribis eĉ telefonis al mi pri Alphonse, mi telefone rilatis kun Alphonse por klopodi havi kunvenon kun li. Post la alveno de Alphonse al mia hotelo, mi tuj ekverkis retmesaĝon komunan, Alphonse kaj mi, al Hans Bakker.

Poste mi iris al edukado.net kaj montris al Alphonse la paĝon pri Afriko en la fotoalbumoj. Tie aperas Alphonse. Poste ni iris al la paĝo Panteono de edukado.net kaj mi montris la prezenton pri Hans Bakker. Mi intervjuis Alphonse kaj tajpis la intervjuon en la retejon. Mi insistis pri kunlaboro inter ĉiuj esperantistoj de Senegalo. Alphonse jesis. Same li jesis en 2011, tamen li restas en sia angulo kun fidelaj parencoj.

### **Bilanco**

Du ministroj aŭdis pri eo.

Elsendoj dissendiĝis sur radio, televido, nacia televido, artikolo aperis en ĵurnalo.

Pluraj valoraj kontaktoj okazis.

Kurso kaj ekzamensesio okazis.

Esploroj pri farebleco okazis.

Tio dum 2 semajnoj. Ne temis pri ferioj...

En madrida flughaveno revenvoje.

Ĵaŭde la 10an de januaro 2013, Mirejo